

ILI REKONIS LIN DUM LA DISPECIGO DE LA PANO – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El evangelio laŭ Luko 24,13-25

Du disĉiploj de Jesuo, en la sama tago de lia reviviĝo, iris al vilaĝo nomata Emaus, kiu estas malproksime de Jerusalemo je sesdek stadioj. Dumvoje ili parolis unu al la alia pri tio, kio okazis en Jerusalemo ĝuste en tiuj tagoj. Dum ili interparolis kaj diskutis, Jesuo mem alproksimiĝis kaj kuniĝis al ili. Sed ili ne rekonis Lin, ĉar iliaj okuloj estis kvazaŭ blindaj.

Jesuo diris al ili: „Pri kio vi parolas dum via irado?” Ili haltis kun malgaja mieno. Unu el ili, nomata Kleopas, responde diris al Li: „Ĉu nur Vi sola en Jerusalemo ne scias tion, kio okazis dum ĉi tiuj tagoj?” Jesuo diris: „Kio?” Ili respondis: „Tio pri Jesuo, la nazaretano! Li estis profeto potenca age kaj parole antaŭ Dio kaj la tuta popolo. Sed la ĉefpastroj kaj la altranguloj kondamnis Lin al morto kaj Lin krucumigis. Ni esperis, ke Li estos la liberiganto de Izraelo, sed jam pasis tri tagoj de kiam tio okazis. Verdire io emociis nin. El nia grupo kelkaj virinoj, irinte frumatene al la tombo, ne trovis lian korpon. Tiam ili revenis, dirante ke ili havis vizion: anĝeloj anoncis al ili, ke Jesuo vivas. Poste iris al la tombo aliaj el nia kunularo, kaj trovis ĉion, kiel diris la virinoj; sed Lin, Jesuon, ili ne vidis.”

Tiam Jesuo diris: „Vere tro malmulte vi komprenas, kaj tro malviglaj vi estas pri kredo je tio, kion la profetoj diris! Ĉu la Mesio ne devis suferi ĉi tion antaŭ sia eniro en la gloron?” Tiam Jesuo klarigis al la du disĉiploj la profetaĵojn, kiuj rilatas Lin mem. Li komencis ĉe la libro de Moseo ĝis tiuj de la aliaj profetoj.

Dume ili alvenis al la vilaĝo, al kiu ili estis direktitaj; kaj Jesuo ŝajnis kvazaŭ Li volus pluiri. Sed ili retenis Lin, dirante: „Restu ĉe

ni, ĉar estas preskaŭ vespere, kaj la suno jam subiras.” Tiel Jesuo eniris por resti ĉe ili.

Poste Li sidis kun ili ĉe la tablo, prenis la panon, eldiris benan preĝon, dispecigis kaj disdonis al ili. Tiumomente iliaj okuloj malfermiĝis, kaj ili rekonis Lin. Sed Li fariĝis nevidebla por ili. Tiam ili diris unu al la alia: „Ĉu nia koro ne brulis dum Li parolis kun ni sur la vojo, klarigante al ni la Skribojn?”

En tiu sama horo ili leviĝis kaj reiris al Jerusalemo. Tie ili trovis la dek unu apostolojn kunigitaj kun aliaj disĉiploj. Ili diris: „La Sinjoro vere reviviĝis kaj aperis al Petro.” Siavice la du disĉiploj rakontis tion, kio okazis al ili sur la vojo, kaj kiel ili rekonis Lin dum la dispecigo de la pano.

De la Evangelioj evidentiĝas ke la disĉiploj ŝajnas esti pli seniluziitaj pri la releviĝo de Jesuo ol pri lia morto. En la plej antikva evangelio, tiu de Marko, la peco finiĝas per la anonco pri la releviĝo de Jesuo al la virinoj, sed tiuj diras nenion al iu ajn. La sama seniluziiĝo evidentiĝas en la evangelio de Luko per la epizodo de la disĉiploj de Emmaus.

Kial tiu seniluziiĝo pro la releviĝo de Jesuo? Se Jesuo mortis tio signifas simple ke ili eraris mesion, ĉar la mesio ne povas morti. Do se Jesuo mortis, ili eraris personon kaj restas nur atendi novan mesion. Je tiu epoko la mesioj naskiĝadis kiel fungoj, do tio signifis ke ili eraris.

Sed, kaj tiu estas la seniluziiĝo, se Jesuo releviĝis, tiam ĉiuj esperoj je restaŭrado de la regno de Izraelo, de regado super la aliaj paganaj popoloj, forvapiĝas. Jes la seniluziiĝo kiu aperas en ĉi tiu peco en kiu estas tiuj disĉiploj kiuj iras, sed kien? Gravas la loko. Emmaus estis grava loko ĉar ĝi estis la vilaĝo kie okazis batalo inter Judaso Makabeo kaj la paganoj, kaj tiu estis venkata de la hebreoj.

Ĝi estis la loko de la espero de la liberiganta Dio, pro la venko super la paganoj kaj la liberigo de Izraelo. Nu Emmaus revokadis ĉion tion, la venko super la paganoj kaj la liberigo de Izraelo. Konstatante do ke Jesuo mortis, kaj ke evidente ne estis li la mesio, jen ke tiuj disĉiploj reiras al la loko kiu estas por ili tiu de la revenko kaj de venĝo de Dio super la paganoj.

El tiuj disĉiploj nur de unu estas dirita la nomo, kiu estas programo en si mem. Li nomiĝas Cleopa, mallongigo de Cleopatros, kiu signifas "de fama patro, de glora patro". Jen, ĉi tiuj disĉiploj plenas je ambicio, gloro, sukceso. Tiu estas la mesio kiun ili volas, la triumfanta mesio.

Ili renkontas Jesuon kaj, kompreneble, ne lin rekonas. Ili rigardas la pasintecon kaj ne povas malkovri la Jesuon kiu prezentiĝas en la novo kaj al li ili konfidas sian tutan seniluziiĝon. *"Ni esperis, ke Li estos la liberiganto de Izraelo"*. Sed Jesuo ne venis por liberigi Izraelon, Jesuo estas la savanto de la homaro. Jesuo ne venis por restaŭrigi la mortintan regnon de Davido, sed por inaŭguri la regnon de Dio. Kaj ankoraŭ en la Aktoj de la Apostoloj legeblas ke, konsiderante ke la disĉiploj ne komprenis tion, post la releviĝo Jesuo, dum eĉ kvardek tagoj, ilin kunigas kaj parolas al ili pri ununura temaro: la regno de Dio.

Nu, je la kvardeka tago, unu el la disĉiploj demandas al li: *"Sed ĉu estas tiu la tempo dum kiu vi rekonstruos la regnon de Izraelo?"* Jesuo parolas pri la regno de Dio, sed ili ne komprenas, ili estas surdaj kaj blindaj, ĉar ilia ideo kaj ilia espero estas la restaŭrado de la regno de Izraelo. Tiam Jesuo *"komencante de Moseo kaj de ĉiuj profetoj, li klarigis..."*

La vorto utiligata de la evangeliisto estas tiu de kiu devenas la vorto "hermeneŭtiko", teknika vorto kiu signifas interpretadon. Jesuo do pli ol klarigi, interpretas la Skribojn. Kial tio? Ĉar la Skribo povas esti lernata nur per la amo. Kiu metas je la unua loko, kiel absoluta valoro, la bonon de la homo, tiu povas kompreni la Skribojn. Tiu estas la ŝlosilo de interpretado de la antikvo kaj de la novo.

Nu, kiam ili estas proksimaj al la vilaĝo – la vilaĝo en la evangelioj estas ĉiam simbolo de tradicio, de nekompreneo de la mesaĝo de Jesuo – la disĉiploj iras al la vilaĝo, iras al la tradicio, ne sukcesas kompreni la novon, dum Jesuo, skribas la evangeliisto, *"ŝajnigis kvazaŭ Li volus pluiri"*. Jesuo iras al la novo kaj ili male iras al la malnovo.

Ĉiukaze ili petas al Jesuo resti kun ili. Kaj *"Poste Li sidis kun ili ĉe la tablo, prenis la panon"*, kiel li faris en la lasta vespermanĝo, li ripetas la samajn gestojn, *"li eldiris benan preĝon, dispecigis kaj disdonis al ili"*. *"Tiumomente"* skribas la evangeliisto, *"iliaj okuloj malfermiĝis, kaj ili rekonis Lin."* Jesuo estas rekonebla kiam la pano estas prenata kaj dispecigata. Jesuo, la filo de Dio, iĝas panon, dispecigas sian vivon por la homoj, por ke

tiuj kiuj lin akceptas kaj kapablas siavice iĝi pano kaj vivnutraĵo por la aliaj, iĝu filoj de la sama Dio.

Tiu estas la sperto kiu igas perceptebla la ĉeesto de Jesuo. "*Sed Li*" ... ne malaperis kiel estas skribite en la traduko, sed laŭlitere "*fariĝis nevidebla*". Jesuo ne malaperis, sed estas nevidebla ĉar Jesuo jam estas videbla nur en la pano kiun oni dispecigas, en la pano kiun oni kundividas, en la komunumo kiu iĝas pano por la aliaj. Fakte, ili reiras al Jerusalemo de la aliaj disĉiploj, tio kion la du de Emmaus rakontas... "*ili parolis pri kio okazis sur la vojo*"

"Sur la vojo" estis la loko de la dissemado sur la grundo, kiun Jesuo klarigis... "*venas la demono*", kiu estas la bildo de la povo kiu forprenas la mesaĝon. Jen kial ili ne komprenis la anoncon, la vortojn de Jesuo, ĉar ili estas trempitaj en tiu ideologio de povo kiu igas ilin rezistaj al la vorto de la Sinjoro. Kaj kiel ili lin nrekonis? Per la dispecigo dela pano. Tiu kriterio validis tiam kaj validas ankoraŭ nuntempe.

Jesuo rekoneblas per sia korpo kaj lia korpo estas la komunumo kiu kuniĝas por iĝi nutraĵo por la aliaj.